eLIBRO

*Petr Tomašovský*

# Humoraĵoj

INKO

*Petr Tomašovský*

**HUMORAĴOJ**

*Originale verkitaj en Esperanto*

*e*LIBRO

*Aranĝis: Franko Luin*

© Petr Tomašovský 1990 — 2002

**ISBN 91-7303-181-X**

*inko@omnibus.se*
*http://www.omnibus.se/inko*

DECEMBRO 2002

# ANTAŬPAROLO

Vi estas malfermantaj libreton, kiu estas verkita por ŝatantoj de humoro, sed ankaŭ por ceteraj legantoj. Mi esperas, ke legante tiun ĉi verketon vi almenaŭ iom ripozos.

Nun kelke da klarigoj al jenaj frazoj. Se iuj frazoj ŝajnos al vi eraraj, do sciu, ke ili estas skribitaj tiel intence, ekz. per interŝanĝo de literoj (ŝtipo - ŝtupo, sako - sago, kolo - kulo - pulo - mulo, ktp.) aŭ per erara vortordo ks.

Sed kial tro klarigi — bonvolu logi, pardonu legi kaj ridi. Kaj tio estas celo de la libreto.

*Aŭtoro.*

- Malpuran ludon ili ludis kun li tial, ke li rifuzis malpurigi kun ili la manojn.

- Ili tiris je unu ŝnuro, sed ĉiu aliflanken.

- ”Mi” estas personalo de la unua mia persono.

- Se ni laŭdos nian malgrandan fraton pro io, li ridetas, ĉar li ankoraŭ ne havas prudenton kaj li volas por tio nenion.

- Li voli edziĝi kun ŝi, ĉar li jam ci-diris kun ŝi.

- Kiam estas kinejo malnova, do ĝi ankoraŭ prezentiĝos en televido.

- Ŝoforoj estas timo de ŝoseoj, ĉar ŝoseoj estas timo de ŝoforoj.

- Kio tiel fiodoras ĉi tie? Ke tiuj floroj tiel bonodorus?

- Li suprenkuris sur ŝtupoj tiel rapide, ke nur post momento estis aŭdebla lia spurbatado.
- Ni ripozis ĉe valbaraĵo, kie la gepatroj post dek kvar tagoj konstatis, ke ili ne konas min.
- Koĉero estis homo, kiu kun ĉevalveturilo atendis en flughaveno pasaĝerojn.
- Al bestoj de afriksavanoj apartenas ĝirafoj, zebroj, elefantoj kaj baobaboj.
- Lernanto renkontiĝis kun laŭta silento de la tuta klasĉambro.
- Knabo havis longajn malantaŭajn krurojn.
- Petro alkriis la tutan straton per mallaŭta kaj trankvila voĉo.
- Laboroj en lernej grundo amuzigas min, precipe kiam mi estas kolektanta rafanetojn.
- Vaganto iradis ĉe domo al domo lernante esti riĉa.

- Matene komencis pluvi kaj posttagmeze ĉesis. Ekpluvegis.

- Pugnoj estas ĉe kelkaj bestoj hufoj.

- Ĉirkaŭbaritaj arbaroj estas fondataj por edukado de arbara bestaro.

- En haveno estas naĝantaj multe da ŝipetoj kaj hometoj.

- Dum somero ni devas ĝardenon priverŝi ĉiutage, alie okaze anstataŭ herbo kreskus fojno.

- Orientigkuro estas bona, ĉefe por tiuj, kiuj trovos celon.

- Mi konas tiujn ĉi akvorezervujojn: maro, fiŝlago kaj bankuvo.

- Turisto demandis, kiel malproksime troviĝas la plej proksima urbo, do ni montris al li tiun malproksimecon.

- Teorio estas tio, kiam ĉiu scias ĉion kaj nenio funkcias.

- Praktiko estas tio, kiam ĉio funkcias kaj neniu scias kial.

- Korpo de fiŝo konsistas el kapo, kiu malrapide ŝanĝiĝas en voston.

- Leono kriegis kiel tigro.

- Multe da tagoj pluvis, ĉar oni prognozis tion.

- Mia fratino estas ankoraŭ tro malgranda, ke ŝi ne distingos nian hundon de ceteraj familianoj.

- Opero estas, kiam mortigito ne mortos, sed kantas.

- Avino ne rigardas televidon, ĉar ni senĉese manĝas kaj drinkas ĉe ĝi.

- Eĉ kiam mi nomiĝas kiel li, iam la paĉjo diras al mi, ke li ne povas rememori mian nomon.

- Kiam oni ne scias ion, oni demandu aŭ lernu.

- Ŝakludo estas ludo, en kiu reĝo ankoraŭ povas ion pruvi.

- Malnovan muelejon aĉetis iaj homoj el urbo, dum ili muelas tie senĉese nur morteron kaj betonon.

- Mutulo diris al surdulo, ke senpiedulo kuru.

- Joĉjo kuŝas, pro sunbruniĝado doloras lin io, sed li ne scias kie.

- Tre frumatene ni iris por kolekti fungojn, sed ni trovis sole nur dormemajn fungokolektantojn.

- Fiŝlago havas pli puran akvon ol rivero, sed ni ne baniĝas en ili.

- Barometro estas aparato por veterkreado.

- Plej bone estas ne timi kaj ekpaŝi rekte en la vivon.

- Urson ni povas forpeli sole per energia kriado.

- Ĉe fiŝlago montris batalpretecon plej multe kuloj.

- Elfosaĵoj estas instruaj, ĉar ili estis elfositaj.

- Materio estas neneniigebla, ĉar atomoj ne estas videblaj.
- Cikonio estas konata birdo, sed neniu plu kredas al ĝi.
- Peruko estas novaj haroj sen kapo.
- Mi volas fariĝi bestkuracisto. Ekde junaĝo mi estis edukata inter brutaro.
- Sklavoj rajtas nenion, eĉ ne iri kinejon.
- Per ŝvito estas foriranta el la korpo fluidaĵo kaj akvo.
- Ferrubon ni kolektas tial, ke ni faras el ĝi novan.
- Vento estas rapida aero, kiun ni ne povas malhelpi.
- Reĝoj ne ĝisvivis altan aĝon pro nesufiĉo de movo, kiun malebligis al ili trono.
- Ribobero estas sana. Plej multe manĝas ĝin nia avino, kiu estas senĉese malsana.
- Caesar konis bone la latinan lingvon, ĉar tiam oni parolis tiel.

- Tiel li ekkoleris, ke li povis dormi nek en songô.

- Per kio vi volas esti? Ĉu per nenio?! Tiuokaze iru konsili kun la paĉjo.

- Se oni ne inventus seĝojn, oni sidus starante.

- Vitro estas kondukilo nekondukema.

- Mallumo estas tio, kion ni vidas, kiam ni nenion vidas.

- Li timis, ke li ne trafus lin, ĉar li tremis pro kolero.

- Duono de ok estas sep kaj tridek.

- Se oni ne inventus necesej-paperon, mi ne povus etendi al vi la manon.

- Rabistoj antaŭe ŝtelis, kaj iam ili ankaŭ poste bedaŭrindulon eĉ mortigis.

- Vi estas malordema kaj aroganta, Josefo. Kiam mi renkontos vian patron, mi diros al li la saman.

- Paŭlo sunbruniĝas tre rapide, matene tio estis li, vespere li ploris kiel tute alia knabo.

- Kaperistoj havis en blazono kadavran kapon, ke ĉiu timu ilin.

- Por ke li povu senkulpigi sin, li devis elturniĝi je tiuj ĉirkaŭe.

- Vaporŝipo estas droniĝinta.

- Se ni rigardas al la suno tra fulgigita vitreto, ni bele vidas suneklipson.

- Unusola animalo en la mondo, kies idoj devas skribi hejmajn taskojn, estas homo.

- Mambestoj nutras sin per nutraĵo kaj birdoj per insekto.

- Nigraj nuboj estiĝas pro vaporiĝado de malpura akvo.

- Homa korpo konsistas el kapo, korpo, ekstremaĵoj kaj vitaminoj.

- Ne kraĉu sub la tablon!! Tie estas amikoj!

- Hieno estas striita lupo.

- Kvar jarsezonoj estas: printempo, somero, aŭtuno kaj vintro kaj ferioj.

- Leono vivas en dezerto en menaĝerioj.

- La plej maljuna ligno estas balailo, ĉar ĝi havas barbojn.

- Kapelo ludis kaj soldatoj iris kiel unu viro sur unu piedo.

- La panjo laboras en kancelario, de kie ŝi telefonas al homoj, ke ŝi ne povas disŝiriĝi.

- Mi havas por ĉiu aĵo lokon, sed mi ne povas tiun lokon ĉiam trovi.

- En vintra arbaro ni ne devas tro krii, ke la naturo ne vekiĝu.

- Plej multe mi ŝatas gimnastikon pro taskoj.

- Praga ponto de Karolo havas riĉan ornamaĵon el skulptistaj produktaĵoj.

- Ni distingas arbarojn koniferajn, foliajn, miksitajn, konatajn kaj nekonatajn.

- Karaktera estas ekzemple tiu homo, kiu scias, ke havas ion kiel karaktero.

- Ju pli multe mi drinkas, des pli multe vi estas pli bela.

- Biciklon mi havas, sed dum sufiĉe faligan.

- Leono ĉasas dum vesperkrepusko, ke ne estu tiom videbla, kion ĝi denove faris.

- Vojaĝado per aviadilo estas rapida kaj iam valoras eĉ ne enaviadiliĝi.

- Talpo estas konata per tio, ke ĝi markas sian loĝejon per butaĵo.

- Orangutango vivas en praarbaroj de Borneo, Sumatra kaj zoologiaj ĝardenoj.

- Inter vortprovizo apartenas ankaŭ novaj vortoj. Oni diras al ili neŭrologismoj.

- Onklo diris, ke li devas eksedziĝi, ĉar li devas edziĝi.

- Fotosintezo estas tio, kiam komenciĝas somero, julio kaj aŭgusto.

- Mia frato estas tiel malgranda, ke li ploras, kvankam mi faras al li nenion.

- Pulmo plenigas pli grandan parton de la brusto, en malpli granda parto ni havas la restantan korpon.

- Ŝafidino alkuris, ĝi ludis kun ni estante malsovaĝa kiel virŝafeto.

- Kiam panjo laŭdas paĉjon, poste mi ĉiam estas punbatita.

- Ekstere pluvas. Mi volis resti hejme, sed prefere mi iros nenien.

- Ursoj estas bone ekzerceblaj kaj ofte ili dancas tute kiel viroj.

- Sumo estas mono, kiun ni plejparte ne havas.
- Instruisto, kiu diktas, estas diktatoro.
- Seninterrompa funkciado de la entrepreno devigis lian oftan neĉeestadon.
- Timeme li zorgis pri tio, ke li ne trotu leĝojn, kaj tial li senteme malobservis ilin.
- Kio signifas por kreskaĵo sterko, tio signifas por junularo lernejo.
- Pluraj prenos subaĉeton eĉ por nenio. Pluraj denove ankaŭ por nenio.
- Matematikon vi eble ne havas preta. Mi vidas, ke en via komputero ne funkcias baterio.
- Tiel longe li dolĉe parolis, ke abelo pikis lin en lian langon.
- Rimarkon el kantado mi ricevis, ĉar mi kantis en leciono de matematiko.

- En kastelo ni vidis ankaŭ muzeon, en kiu estis ŝtopita la arbara kaj la akva naturo.

- Onklo Karolo estas granda sportisto; li ege dum futbalo alkrias ĉiujn.

- Princo ne iris kaj ne iris, princidino ĉe drako ploris, ke ŝi verŝis larmojn.

- Kaptado de vivbestaro havas grandan signifon por eksporto, ĉefe eksterlanden.

- Hodiaŭ mi venis baldaŭ, ĉar nia tramo haltis kaj mi venis piede.

- Lalala lala la. Tio estas tre bela kanto. Mi bezonus skribi ĝiajn vortojn.

- Dum festotagoj vizitadas min amikoj kaj ni ĝoje rigardas, kiel estas dismunteblaj novaj ludiloj.

- Mi ŝvitis tiel, ke mi dancis.

- Rekompenco pro malpermeso de fumado.

- En riparejon ni akceptas ankaŭ alumetojn.

- Dum balo mi dormis tial, ke mi drinkis kaj drinkis kaj drinketis, kie tio eblis, ke mi ekdormis; mi sonĝis, ke mi tro drinkas kaj drinketas kaj ke mi ekdormis.

- Mi suprensaltus ankoraŭ pli alten, sed mi timus fali suben.

- Dentpasto estas bongusta, sed oni devas elkraĉi ĝin.

- Avino diris, ke ni naskiĝis tial, por ke ni estu helpantaj tiujn aliajn. Kaj kial naskiĝis tiujn aliajn?

- En via matematika kompozicio mi trovis kelke da numeroj de nekonata deveno.

- Mia frato estas okupita kiel baletistino.

- Kiel mi tiel rigardas ĉirkaŭ mi en la strato, do alkoholaro povus aparteni inter armiloj de amasa neniigo.

- Artisto A. alveturis urbon B., kie li estis eminente bolvenigita.

- Sur petskribon algluu tri kvinkronajn kompostmarkojn.

- Al alvokita kuracisto rakontis mortinto.

- Li ekmienis, kvazaŭ taŭro ricevus grioton.

- Li estis tre nervoza homo. Li primordis siajn ungojn ĉe la piedoj.

- Plimulton de la vivo li adiaŭis kun la mondo.

- Ke mi en arbaro ne vojeraru, mi faris je arboj nodojn.

- Mi eksiris kun lia tuta interno.

- Hodiaŭ mi ekzamenos knabinojn. Georgo, komencu!

- Nu, vi vidas, vi estas klara pruvo, kiel malmulte da cerbo povas ridigi aŭskultejon.

- Mi estas transdonanta al vi la korektitan hejman taskon. Diru al la paĉjo, ke li jam sufiĉe pliboniĝis, sed senĉese tio ne estas ĝi, kion mi atendas de li.

- Militservo vin eklernos. Kaj poste edzino.

- Kiu venontfoje ne havos skribitan hejman taskon kaj ankoraŭ aĉe skribitan, tiu ricevos rimarkon.

- Mi enŝotus golojn, sole se tie ne estus golulo.

- Kvaranteno estas aldonitaj ferioj.

- Kiu naĝas vestita, tiu dronas.

- Deca homo estas tia, kiu kolektas en la stratoj paperetojn kaj ĵetas ilin en korbojn.

- Multe da famaj virinoj el nia pasinteco transiris en histerion.

- Infanoj pli multe obeas patrinon ol patron, ĉar patrino pli ofte parolas.

- Lernanto Joĉjo, diru al la gepatroj, ke ili haltu ĉe mi en la lernejo ... Aŭ atendu, diru tion prefere al la avino. Por ke tio havu signifon.

- Sento de malsato, Georgo, ne estas destinita per tio, ke vi volas manĝi, sed per reciproka frotiĝado de stomakparioj. Sed ili malmultfoje frotiĝas tiel forte, ke tio ne estu eltenebla ĝis paŭzo.

- Memoru, kalio estas fiulo. Eĉ nesciante ĝi eksplodos kiel ekzemple ... lernanto Novulo el ripetekzerco.
- Kion vi diros al mi pri ŝraŭbo de Arĥimedes? Anticipe mi atentigas, ke ne sufiĉas scii, ke inventis ĝin Arĥimedes.
- Kurinte mi faris personan rekordon, sed poste mi konstatis, ke mia horloĝo haltis.
- Triobla salto estas, kiam ni dum unu kuro trifoje saltos.
- Magiisto senĉese pripensas, kiel li trompus publikon.
- Paĉjo estas tia, ke apenaŭ ferminte la pordon li malfermas bieron.
- Kiam estas stultulo saĝa, tiuokaze tio signifas, ke li estas el fabelo.
- Via puno estos skribi centfoje: ”Mi estas la plej granda maldiligentulo.” — kaj vi donos tion al la paĉjo, ke li subskribu tien sian nomon.

- Rektlinio estas linio, kiu fleksiĝos eble nur en senfineco.

- Imagu tiun silenton, se oni estus dirantaj sole tion, kion oni scias.

- Ke mi havu firman sanon, veturigas min la paĉjo al kabano kun cemento.

- Virinoj vivas pli longe ol viroj. Precipe vidvinoj.

- Pikiĝinte je najlo mi devas atenti, ke mi ne rustiĝu.

- Tranĉaĵo estis tiel granda, ke ĝi elstaris el mia buŝo.

- Viaj konoj el la germana lingvo konsistas plimulte en vortaro.

- Vi estas lernanto ĉion kapabla krom lernado.

- Mi havas pro via respondo miksitajn sentojn.

- Faladi sen permeso de sur seĝo estas aroganta!

- Vi havas tute originalajn ideojn. Damaĝe, ke nur en ortografio.

- Por iuj el vi la kapo estas nur fino de la propra korpo.
- Veku Josefon kaj ni finigos la lecionon.
- Do per tio ni finas studadon de homa skeleto. Ĉu iu havas al ĝi rimarkon?
- Romon igis bruligi Hektor aŭ iu alia hundo.
- Gastojn ni retenadas per biskvitoj kaj per sukoriĉaj paroloj.
- Dum lernejvundiĝo plej multe doloras la kapo la direktoron.
- Kiu estas hardita, tiu bezonas timi nenian kompanion.
- Taskon mi ne sukcesis finskribi, ĉar estas mallogaj paŭzoj.
- La paĉjo punis min, ĉar li diris, ke li amas min. Tiom da amo mi ne meritis.

- Se mi ne trovos solvon de hejma tasko, tiuokaze ĝi estas nesolvebla.

- Ludinte je soldatoj mi falis en kavon, sed entute mi ne ploris, ĉar tie estis neniu.

- Ĉina silk-arto venis Eŭropon per maniero nomata kontrabando.

- Insulo Borneo estas troloĝigita de venenserpentoj.

- Kokino ne ekdormos sur la tero, ĉar ĝi tie ne havas kokinejstangon.

- Tineo estas kontenta kun malgranda nombro de nutraĵo. Ĝi konsumas sole truojn.

- El ligno brulas plej longe alumeto.

- Heliko estas el ĉiuj bestoj la plej forta, ĉar ĝi kunportas ankaŭ domon.

- Vento estas utila pro tio, ke ĝi blovas kaj priblovas nin.

- Barometro estas metro je vetero.

- Kial estas ĉi tie tia bruo? Via puno estos kvin minutoj stari. Sidiĝu kaj hontu,

- Iru en kabineton por libro. Nun tie estas neniu, do prenu ŝlosilon. Kaj ne forgesu ekfrapi.

- Estas necese skribi per la tiel nomata alineo. Tio signifas de ĉi tie ĝis tie.

- Jen vi vidas kranion de gorilo. Tio estas rara afero. En nia urbo ili estas nur du. Unu estas en niaj lernejkolektejoj kaj la alian havas mi.

- Tion ĉi vi ne bezonas scii, sed mi diras tion al vi tial, por ke vi sciu tion.

- Kion mi farus al kiu, ke la sorto punas min per tia klaso?

- Kapo estas grava por ĉio. Ankaŭ por manĝaĵo.

- Feriojn ni havas por ripozo, sed la paĉjo diris, ke ni ripozos nur post ferioj.

- Najbaroj bredis pursangajn kolombojn. Mi nur malgrandan hundidon.

- Tuj naskiĝinte mi heredis vestojn de la fratino.

- Malgrandaj infanoj havas tre klarajn okulojn, ĉar ili havas ilin ankoraŭ novaj.

- Kamelo havas hejmon nenie. Ĝi vagadas senĉese en dezerto.

- Plej mallongaj tagoj estas dum ferioj, eĉ kiam ili estas plej longaj.

- Mi ne scias multe legi, ĉar mi ne havas okulvitrojn kiel la paĉjo.

- Eĉ kiam cent leonoj penus, kontraŭ via kriegado ili ne havas ŝancon.

- Ni regule estus ekzercontaj ... Unufoje matene, alifoje ekzemple alifoje.

- Dresisto prezentis sovaĝajn leonojn, kiuj plejparte kuŝetis.

- Abeloj vivas en kompanio. Tial ili svarmas estante tre sovaĝaj.

- Kun la frato ni interkomprenigâs tre bone, li ankaŭ suficâe kolerigas.

- Falanta pomo batis Newtonon en la kapon tiel forte, ke ĝi kaŭzis renverson en tiama fiziko.

- Testudo havas fortan karapacon kaj tiu ŝirmas ĝin tiel bone, ke ni povas bredi ĝin eĉ hejme.

- Eble mi neniam edziĝos. Kun tia atesto neniu volos min.

- Emancipado de la fratino devigis min iradi aĉeti.

- Mi estis en zoologia ĝardeno kaj unu besto tie havis peltmantelon de mia patrino.

- Hieraŭ mi forsuĉis per polvo-suĉilo okulharojn de la patrino, do ŝi ne povis iri en teatron.

- Hundo estas ĉe budo alligita tial, por ke ĝi gardu ŝteliston.

- Mia panjo havas ĉiam pli bonan ateston ol la via.

- Komuna posedaĵo estas tio, al kio ni estas nezorgemaj.
- Antaŭe oni plugis per plugilo, kiu estis iom tirata el unu flanko per ĉevalo, el la alia per pluginto.
- Nokte sonĝis al mi, ke mi vekiĝis, kaj tuj matene tio plenumiĝis al mi.
- Mi scias, kiel oni faras linietojn, sed mi ne scias kie.
- En Venezio fluas akvo el kanaloj rekte al homoj en ŝuojn.
- Historiajn memoraĵojn ni dividas je enfositaj, videblaj kaj diverse disŝutitaj.
- Montaraj riveretoj estis sekiĝintaj pro turisma trafiko.
- Mi ludas tiel, kiel deziris tion Johano Amoso Komenio en infanĝardeno.
- Montarojn Altaj kaj Malaltaj Tatroj ni diferencigas laŭ tio, kiel multe doloras nin sur ili niaj piedoj.
- La panjo rakontis al mi pri la vivo, kiu forkuris al ŝi kaj ni do veturis ekskursi post ĝi.

- Kampagariko kreskas eĉ en sterko, kiu gustas al mi plej multe.
- Tiu, kiu malsanas, devas suferigi la stomakon per dieto.
- Dum komedio mi kondutas dece tiel, ke mi senĉese ridas.
- Hundo jelpas, ĉar mia muziko nenion diras al ĝi.
- Hejmen mi venis nur vespere, ĉar ni kun knaboj ludis je trajno kaj ĝi estis malfruiĝinta.
- Paĉjo scias ortografion tiel bone, ke li faros eraron plimulte nur tiam, kiam li skribos ion.
- Plej valoraj malkovroj estas tie, kie estas nenio.
- Praepoko estas periodo, pri kiu ne estas konservitaj skribinformoj, sole filmoj.
- Konsciu, ke nur brasiko donas signifon al timigilo. Ne male.

- Li forbrulis pro honto, kaj ne, ke liestis mortbruligita.

- En lia buŝo formiĝis salivoj anstataŭ vortoj.

- Ŝtelisto estas homo, kiu netradicie solvas sian loĝej-problemon.

- Ĉiuj ĝenroj estas brilaj krom vivprozo.

- Per cindro ŝutata sur la kapon laŭrokrono densiĝas.

- Katapulteto servis al ŝtonĵetado sur burgojn, kastelojn kaj aliajn kulturmemoraĵojn.

- Skurĝo estas substantivo, kiun oni ne uzu.

- Ido de ŝafo nomiĝas ŝafido; ĝi estadas plimulte granda kiel malgranda ŝafino.

- Enciklopedia klereco estadas dense anstataŭata per krucenigma.

- Homoj kavernaj eĉ ne sonĝis, ke duonlumo foje iĝos moda lumigo.

- Se prenos virino sorton de sia edzo en la proprajn manojn, ŝi povas eĉ levi lin ankaŭ el brakseĝo antaŭ televido.
- Kian klerecon devas havi instruistino de genia infano?
- Mielo estiĝas tiel, ke abeloj viŝas siajn kruretojn.
- Kolumbus trovis Amerikon hazarde. Malbone li orientiĝis kaj kunpuŝiĝis.
- Johano Amoso Komenio devis foriri el patrujo tial, ke li volis, ke lernejo estu ludo.
- Malgrandan fraton ni veturigas en infanveturilon; li estas nur gefrato.
- Televidon mi povas rigardi nur tiam, kiam mi tute solvis lernejon.
- Montaro Altaj Tatroj apartenas al plej bela partituro de Slovakio.
- Plataĵo estas senfina loko de plataj punktoj.

- Lernanto neas sian nomon kaj la klaso asertas, ke ĝi ne konas lin.

- Urbojn ni estus konstruontaj en vilaĝoj, ĉar tie estas pli pura aero.

- Necertajn cifrojn ni uzas ekzemple tiam, kiam ni postulas de la patrino poŝmonon.

- Atmosferajn perturbojn ni ekkonos en radioaparato.

- Paĉjo ne pritaksis veturvojon kaj skrapdifektis sian malantaŭan parton.

- Supraĵa minejo estas elfosita truo en la terglobo.

- La aero estas io, kio ne estas videbla kaj estas multe da tio.

- Masonisto portas kaskon, por ke li en paneldomo ne skrapdifektu sian cerbon.

- El historio mi konas plej bone hieraŭan tagon.

- Terpomoj alnaĝis Eŭropon en devena stato surmare.

- Mi manĝis melonon, sed tio estis pomo.

- El ĉio mi plej multe ŝatas gimnastikon, ĉar mi estas liberigita de ĝi.

- Kiam en mia biciklo ĉesos funkcii bremso, do mi prefere tuj haltos kaj iros piede.

- Hodiaŭ mi havas en skriblaboro eĉ ne unu ortografian eraron. Ni skribis matematikon.

- Sano estas neniam aĉetebla, ĉar ĝi estas nevendebla.

- Manbestoj, kiuj nutras sin per insekto, nomiĝas birdoj.

- Doktoro mi ne fariĝos, ĉar mi kapablus mortigi eĉ ne muŝon.

- La patro punis min tiel, ke mi devis elfumi ankoraŭ unu cigaredon.

- Mi havas reŭmatismon kaj kvar infanojn sekve de humida loĝejo.

- Tiu oficisto, kiu ne volis doni al mi karbon, estus ironta dormi al mi, por ke li ekkonu, kiel mi havas humidan truon.

- Finante mi volus altenlevi s-ron Agleton por ovoj kaj lian edzinon por lakto.

- Kial ili ŝotas en tiun golejon, kiam tiu knabo kaptas tion?

- Pezlevisto pezlevas halterojn malrapide, por ke spektantoj pli longe ĝoju el tio.

- Alten mi saltis 150 centimetrojn. Sed de supre.

- Ĉar mi ankoraŭ estas malgranda, mi ne povas vagi tra la urbo kaj serĉi miajn gepatrojn.

- Vendejon mi iradas tial, por ke mi eklernu esti pacienca dum atendado.

- Mumio estas homo ŝmirita per ĉiuj ŝmiraĵoj.

- Saliko povus envii al vi kavecon.

- En nia genealogia arbo mi havas lokon sur branĉo.

- Prahomo varmigis sin per frotado.
- La paĉjo lernas esti saĝa telestude.
- Neandertala homo estas antaŭulo de mia patro, kiu jam estis klera.
- Husanoj ne timis malamikoj, ĉar ili iris kun siaj edzinoj.
- Serpentoj estas sibluloj.
- Se ne estus akvo, ni havus nenie por lerni naĝi kaj ni ĉiuj dronus en ĝi.
- Kiel io sekiĝos kaj bonodoros tio, tiuokaze tio estas fojno.
- Strobilo dehiskos kaj semoj elflugos en la fekundan aeron.
- Mia edzino vundiĝis sekve de svingo de vosto.
- Mi praktikas diversajn specojn de sporto, sed plej multe mi ŝatas pidpilkon kaj futbalon.

- Kolekti fungojn en arbaron mi iradas tre ĝoje, eĉ pli prefere ol lernejon.

- Vespere ni havis komencante tendarfajron, kiu plej baldaŭ ne volis bruli, sed poste ĝi ne volis sin estingigi.

- Estroj grupigis nin en kabanetojn laŭ tio, ĉu ni naskiĝis kiel knaboj aŭ knabinoj.

- Lumbriko estas utila, se estas iu fiŝkaptisto kaj povas kun ĝi fiŝkapti.

- Al homo estas iksodo danĝera per tio, ke ĝi povas postlasi la piedeton en la korpo.

- Alveturinte al avino ni purigas ĉiam ŝiajn ŝtupojn, por ke brulu en kameno.

- Ĉapon mi portas tial, por ke mi povu depreni ĝin.

- Pramontaroj estas konataj per tio, ke tie vivis fosilioj.

- Kaprino estas parazito, ĉar ĝi ĝoje parazitas en fremdaj ĝardenoj.

- En la kapo ni havas kaŝitan prudenton, al kiu oni diras cerbo.
- Karapaco ŝirmas testudon tiel bone, ke ĝi rampas viva.
- Taŭro estas bovo, kiu sovaĝiĝis.
- Nigra humoro estas, kiam ŝercas kamenpurigistoj.
- Antaŭkuri ceterajn estas ebla per subgrimpado.
- Kie nenio estas, eĉ ne morto prenas. Kaj kie nenio prenas, tie estas fiŝkaptistoj.
- Kelkaj viroj pagas per mono, aliaj per libereco.
- Viro, kiu haltos antaŭ nenio, ne apartenas malantaŭ stirrado.
- Pluraj faros transkapiĝon, ke ili komprenu, ke sufiĉas fari paŝon.
- Vekhorloĝo vekos neniun el tiuj, kiuj ekdormis je gloro.

- Malfortuloj plej multe laciĝos dum fortiga parolado.

- Edziĝinta mi ankoraŭ ne estis, sed da malsukceso mi travivis sufiĉe.

- Nian konflikton ni trankvile solvis per kverelo.

- Silentu!! Aŭ mi ĉi tie faros bruegon!

- Kiel vi vidas, karaj gelernantoj, vi nenion vidas. Kaj kial vi nenion vidas, tion vi tuj ĉe eksperimento ekvidos.

- Dum leciono ne dormu, tio ne valoras. Tamen estos post momento paŭzo.

- El legomo mi plej prefere manĝas karoton kun viando, sed karoton mi forĵetas.

- Mi ŝatas iradi lernejon, mi ŝatas iradi el lernejo, sed mi ne ŝatas esti tie.

- Pizo estas legomo en piloloj.

- Erinaco, rano kaj paruo helpas ĝardeniston manĝegi raŭpojn.

- Tio estas interesa. Ludantoj estas numeritaj kaj ili estas kurantaj, kiel ili volas.

- Mineralo, kiu eĉ nokte lumas, estas ampolo.

- Fajro estas multe eksplodema aĵo.

- La aero estas kondiĉo de la vivo. Se ni provos firme fermi la buŝon kaj samtempe premi nian nazon kaj se ni eltenos, kiel longe ni volos, do se tio sukcesos al ni, ni estas sufokitaj.

- Konkursantoj kuras al celo tial, ke la unuaj tri ricevu rekompencon.

- La avino skribas, kiel ŝi ĝojas vidi min, ke onidire ŝi jam longe ne ekkloris.

- Paŭlino tute bone sportas, ĉar ŝi estas bela.

- Konstrui atombombon ne estas malfacila. En lernolibroj de fiziko estas pri tio instrukcioj.

- La paĉjo diras, ke infano estas feliĉo en la familio, ĉar ekde l¥ naskiĝo de Manjo mi ne devas gitarludi.

- Kiam la patro kverelas kun la patrino, tiam li silentas.
- Se vi veturos per okdekkilometra rapideco en abruptan vojkurbiĝon, vi estos agrable surprizitaj.
- Tio estas bela, eĉ rekte belega, sed prefere rapide forviŝu tion.
- Izolaĵon pentru en la akvon.
- Se vi ne atentos notojn, do mi diros al viaj gepatroj, ke vi havas talenton.
- Pianludistinoj vestas sin kolore, por ke ili reflektiĝu de la piano.
- Krom lernado proponas printempo ankoraŭ pluan amuzon.
- Ĝoje mi hejme legas, ĉar mi baldaŭ ekdormos.
- El diversaj sportoj mi plej multe ŝatas gajnon.
- Tiun fenestron mi disrompis, sed mi celis vere en golejon.

- Klimato estas ĉe ni malseka.
- Ankoraŭ li ne troviĝis kaj jam li estis perdita.
- Tial mi havas multe da eraroj, ke la tasko tuj ne plaĉis al mi, sed mi sidiĝis al ĝi nepensante pri ĝi kaj skribis.
- Ŝirma masko servas al tio, ke malamiko ne ekkonu nin.
- Li faras simple kion li volas. Precipe nenion.
- Li kapablis paroli eĉ nenion dirinte.
- Kiam vi dronas en mono, ne zorgu pri savonto.
- Okulo pro okulo, dentoj pro botelo.
- Antaŭe junulinoj skribis por si taglibretojn, nun ili havas kartotekon.
- Pli bone estas estro mankaptita ol fianĉo sur tegmento, diras sekretariino.
- Mi ne pafas malbone, nur mi malbone celas.

- Miksaĵoj estas miksitaj substancoj, kiujn ni ne povas apartigi per nura okulo.
- Firman volon mi havas. Ekzemple tion, kion mi volas manĝi, tion mi manĝos.
- La paĉjo estas timemulo. Ĉiam, kiam ni estas transirantaj vojkruciĝon, tiam li ĉiam prenas min je la mano.
- Al homoj, kiuj senĉese informdemandas, ni diras instruistoj.
- Gardostarante mi ne timas. Ni ĉiam timas du.
- Kalvulo lamentis, ke kombiloj estas pli multekostaj.
- En la akvo spiras el mambestoj ekzemple skafandristoj.
- Pafante mi devas fermi unu okulon. Se mi fermus ambaŭ, mi ne vidus, kion mi trafis.
- Nia instruistino en la klasĉambro dissidigis nin kaj nun ŝi atendas, kio elkreskos el ni.

- Oni povas manĝi ĉiujn fungojn, sed kelkajn sole unufoje.

- Kiu ne laboras, tiu ... ne laboras.

- La akvo komencas boli tial, ĉar ĝi ne plu povas tion elteni.

- Gorĝa rajto estis rajto porti ĉirkaŭ la kolo apartajn ornamaĵojn.

- La unuan loĝiĝon ni trovos ĉe ni en lernolibro.

- Strigoj estas noktaj rabobirdoj, dum la tago ili estas obeemaj.

- Por ke mi ne streĉu vin, tial mi haŭlos vin.

- Inter kornoj de malgrasa bovino havas neston tintilivantilio. En la nesto estas kvin tintilivantilietoj. Kiu detintilivantiliulo kapablos ilin detintilivantiliigi, tiu iĝos reĝo de detintilivantiliuloj.

- La akvon ni pesas per akvonivelilo.

- Multego de pluvo dependas de distanco de la bordo de la maro.

- Ĉasistoj de mamutoj mortbatis mamuton per ŝtonoj kaj per gaja krio.

- Birdoj flugas, eĉ kiam ili havas du krurojn.

- Multe da incendioj estiĝas ankaŭ per tio, ke oni lasas ie kuri sen kontrolo elektron.

- Elektra ampolo estas konservaĵo kun lumo sur drote-to.

- Termometron ni uzas kontraŭ febro.

- Kelkaj antikvaj popoloj ne havis lernejojn, do hodiaŭ ni ne solvos iliajn skribsistemojn.

- Krokodilo insultanta pulojn ekkokokriis tiel forte, ke el dezerto forflugis ĉiuj kameloj.

- Hundo malfermegis al leterportisto la dentojn.

- Gepatroj konsistas el patro kaj el patrino.

- En tendaro mi manĝos ankaŭ tion, kion mi mem kuiris.

- El tunelo eskapas mallumo el du flankoj.

- Optimisto estas viro, kiu edziĝos kun sia sekretariino esperante, ke li povos ankoraŭ iam dikti al ŝi.

- Oni diras, ke la plej bona defendo estas atako, sed se vi perdos dum dancbalo geedziĝ-ringon, estiĝas demando, ĉu estas plej konvene insulti pro tio la edzinonm ke ŝi ne fermkudris truon en via poŝo.

- En lernejo ni nunjare havos multe da laboro. Sinjorino instruistino diris al ni, ke ni estas lernontaj.

- Paĉjo volis iri kinejon kaj panjo teatron. Tial mi vidis novan operon.

- Kukolo vivas en arbaroj, kie ĝi trompas en nestoj.

- Stalagmitoj kaj stalaktitoj estiĝis per tio, ke ie gutis longtempe la akvo kaj neniu pri tio sciis.

- Birdoj havas bekon, laŭ kiu ni povos ekkoni, kian kanton ili kantas.

- Naĝante en rivero mi ne parolas, por ke mi ne ĝenu fiŝojn.
- Husanoj kapablis venki siajn malamikojn per kantado kaj per rido.
- Antaŭ la unuaj aŭtomobiloj devis paŝi viro kun flageto. Hodiaŭ rapideco iom plialtiĝis.
- Venenajnkreskaĵojn ni metas al malsanuloj en teon.
- Ĉasisto vivas en arbaro tial, por ke li konservu inter arboj ordon.
- Dum festotagoj mi multe legas, precipe instrukciojn, kiel oni ludas ludojn.
- Al la fratino mi aĉetas utilajn donacojn, kiel ekz. remaĉgumojn, ĉokoladon aŭ bombonojn.
- Mi dezirus tian pupon, ke ĝi estu precize tia, kian mi volas, sed ankoraŭ iom pli bela.
- Ĉiu kverko antaŭe nomiĝis glano.

- Kristnaskan arbeton ni havas sur tablo en loĝoĉambro, dank' al tio ni preskaŭ entute ne stumblos je ĝi.

- En arbaro estas danĝere bruligi fajron, ĉar ĝi povus ekbruli.

- Kelkaj kreskaĵoj estas venenaj kaj ni ne devas ilin igi primordi al pli junaj gefratoj.

- Malgrandaj infanoj kreskas tial, ĉar ili volas vidi pli malproksimen.

- Ĉu tiu ĉi retikulo estas el krokodilo? Tiuokaze certe bedaŭrindulo krokodilo ne estis en sia haŭto.

- Romantismo estas, kiam viandista hundo bojas al luno.

- Hieraŭ mi dum la tutaj du tagoj kuŝis.

- Al atako je arbitranto okazis tial, ke li rekonis golon, kiu ŝotis per la kapo unu el rigardantoj.

- Nokte mi tiel ŝvitis, ke la edzino vekiĝis.

- Ansera beko estas longa kiel ĝia kapo.

- Hieraŭ okazis al mi tio, ke mi estis dekjara.

- Ankaŭ mi anonmcas min. Ekzemple tiam, kiam instruistino demandas, kiu ne komprenas al tio.

- Ŝi gumis fraton, kiu la paĉjo tro ne sukcesis fari.

- En balaaĵejo superas fiodoroj de diversa bonodoro.

- Li saltis de sur ponto la akvon kaj spite al kelkfoja alvoko li ne elmergiĝis.

- Deliktulo estis en tia stato, ke al nia alvoko — haltu — li falis.

- Mi estis ĉe kuracisto, ne gustumis al mi manĝi, sed li trovis ĉe mi ian senapetitecon.

- Vundiĝo de turisto F. K. okazis pro falo en malsatmortigejon, pri kies rebonigo neniu zorgis ekde la jaro 1277.

- Knabon mi eltiris, sed kiam likriis, ke li havas en la fiŝlago ankoraŭ ĉapon, tio jam iom tuŝis min.

- Kiu vagulon, kiu ponton, kiu ĉe ŝoseo, kiu el Madrido ĝis Varsovio kondukas, staras, kuŝas, dehakis, denuncus, tiu anoncu sin.

- Tero turniĝas ĉirkaŭ Suno influe de Kopernik kaj Galileo Galilei.

- Pri tio, ke neĝo estas frostiĝinta akvo, ni konvinkiĝos ekzemple per tio, ke ni metos ĝin al iu sur la kolon.

- Cilindro en realeco similas al tre plenblovita paralelogramo.

- Homojn en loĝdomaro mi ne konas. Tio estas fremdaj loĝantoj de nia urbo.

- Kiso estas nenio dividita per du.

- Ovo havas formon de cirklo, kiu falis.

- Tuno estas dek kvintaloj en kilogramoj.

- Mi devas nian hundon Azoron laŭdi. Ĝi estas jam tiel saĝa kiel mi.

- Jam en ŝtonepoko havis homoj la tutan ilaron por tio, por ke ili fondu familion.

- Por bona vorto — kelke da vangofrapoj.

- Materio estas neneniigebla, sed ĉio estas disrompebla.

- Kiu mensogas, tiu ŝtelas kaj kiam tiu diras, ke li ne ŝtelas, tiam li mensogas.

- Urso havas grandegan forton, pli bone estas dum renkontiĝo ne interbati kontraŭ ĝi.

- Fiŝoj havas nek manojn nek piedojn, ĉar pro malvarmo kaj humideco ili havus reŭmatismon.

- La akvo jam ĉesas esti. Bonvolu fari provizojn da aero.

- Stultaĵo ĉesas esti stulta, kiam oni faras ĝin inteligente.

- El arbaro aŭdiĝis profunda silento.

- Kiel oni riparas biciklon: Kaj poste ni trifoje pumpos per pumpileto en tion ...

- Ganto havas unu truon ĉefan kaj kvin apudajn.
- Kuron mi ne trejnis, sed alie mi ĝiskuros ĉiun.
- Ni subenportis divanon de nia avino, kiu jam dek jarojn mallaboris en subtegmentejo.
- Proksime kuŝis en neĝo skioj ĉe liaj gamboj, kiujn li ĵus malbukis.
- Kiu laboras kiel ĉevalo, tiu estas azeno.
- Ĉu vi volas esti stultulo nur tial, ke sidadu sur vin feliĉo?
- Per unu mano li tenis la senspiritan korpon de sveninta virino kaj per la alia mano li helpvokis.
- Tiu ĉi geedzeco estas feliĉa. Li estas profesoro de matematiko, ŝi estas kalkulema.
- Vi malkonfesus la okulojn inter la nazo.
- Ĉu vi scias, kiel tio estas alte suben?
- Forĵetu la manon kun globo.

- Danĝeraj estas revuloj sen fantazio.

- Mi tagmanĝas, se mi ne revenos ĝis la 15-a horo, ankaŭ mi vespermanĝos.
  Estro.

- Mi idiotiĝos ĝis vendredo, kaj ankaŭ mi ne freneziĝos.

- Mi bezonas kvaroble iun, kiu skribas legeble.

- Kiaj estis negativaj pozitivaĵoj ĉe tiu ĉi atenco?

- Homon speciale, diris kanibalo.

- Se mi saltos el fenestro, mi ne povas supozi, ke mi flugos supren.

- Vivo estas hundo. Kaj hundo estas la plej bona amiko de homo.

- Ĉio estas indiferenta por mi, vi povas eĉ trarigardi min.

- Studento Novulo, vi ne pensas malrapide, sed respektive, kiel ŝajnas, entute.

- Se rezulto egalas al nulo, ni kalkulis senbezone.
- Nulo estas la plej malgranda ronda numero.
- Subjekto neesprimita en frazo estas, kiam ĝi tie ne estas.
- En maro de vivo naĝas ankaŭ multe da nenaĝantoj.
- Labordormo estas dormo kun zorgema mieno en la vizaĝo.
- Ŝi vestas sin nur tiom, por ke ili ne kulpigu ŝin pro elvestado en publiko.
- Kelkaj homoj el vintra dormo estas vekiĝantaj en printempan laciĝon.
- Kaj hodiaŭ ni ĵetiĝos je pluaj du aŭtoroj.
- Hundo bojas, ĉar ĝi insultas min per tio.
- Elefanto timas musojn, por ke ili ne enrampu en ĝian rostron.

- Veturante per trajno ĉiuj arboj estas revenantaj.
- La naturo legas nin al si.
- Petveturantinojn mi principe ne prenas. Mi nome ne havas aŭton.
- Fotosintezo estas, kiam iu iun fotas en la naturo.
- Tendaron ni alveturis ĉiuj en ordo krom tiuj, kiuj entute ne alveturis.
- Enviciĝinte ni ekkantis kune ĉiu ion alian.
- Dum la tuta unua nokto ululis al ni strigo kaj apenaŭ ĝi finis ululi, ektrumpetis tendarestro, ke jam estas mateno.
- Globo ne similas al kapo, ĉar ĝi havas orelojn.
- Legomon ni devas bone sterki, ĉar ĝi estas sana.
- Fungoj povas veneni homojn. Parte venenaj kaj parte, se oni ne trovos tiujn ĝustajn.

- Lerni mi devas tial, ke la panjo ne blasfemu al mi, ke mi ne lernas.

- Mikaelo jam ne scias, kiel li mensogus, do li diras, ke li ŝatas lernejon.

- En mezepoko oni serĉis vivakvon, ĉar da pura estis sufiĉe.

- Pri Pythagoras mi scias, ke li diris frazon.

- Geografio estas por mi la tuta mondo.

- Kantistino rigardis tuj al plafono kaj tuj denove al siaj ŝuoj, ĉar ŝi hontis, kiel ŝi kantas.

- Frazoj kun personaloj ”mi” kaj ”vi” estas ekzemple: Mi diros: ”Mi iros eksteren.” La panjo diros: ”Vi restos hejme.”

- La langon mi ne povas pli multe montri, ĉar ĝi estas malantaŭe alligita.

- Li amis sian laboron je nivelo de epoko. Li estis al ĝi malfidela.

- Tion, ke li havas ankaŭ la kapon, ni ekkonis nur tiam, kiam li serĉis sian ĉapelon.

- Ili ŝtelis en entrepreno tiel konscience, ke ankoraŭ ili estis kapablaj konsigni eĉ ŝparaĵojn.

- Kiu kapablas manĝi per la okuloj, tiu ne bezonas manĝilaron.

- Muziktalento ne signifas ĉion eltrumpeti.

- Ĉe kelkaj filmoj estas malfacile distingi, ĉu la filmo finiĝis aŭ tratiriĝis.

- Ĉiuj ricevos rimarkon pro ĝenado krom lernanto Novulo. Mi vidas, ke li dormas.

- Kiu volus pri la afero ekscii pli multe, tiu trovos pli proksimajn detalaĵojn en la dua ĉapitro sur la paĝo 35. La nomon mi bedaŭrinde forgesis.

- Bono por homo estas ekzemple fragoj kun ŝaŭmkremaĵo.

- Amiko estas tiu, kiu la alian ne forlasos, eĉ ne tiam, kiam tiu iras por momento for.

- Krokodilo atingas longecon ĝis 7,5 metroj, iam eĉ je unu centimetro pli multe.

- Salo estas kombinaĵo de acido kun bazo kaj ĝi malbonigas nutraĵojn, se ni ne donos ĝin en ilin.

- Tiu, kiu ĉion vidas per propraj okuloj, estas orela atestanto.

- Ju pli multe oni dikiĝas, des pli multe oni plimalfortiĝas.

- Mi ĝojas ridi, ĉar ili ankaŭ senĉese ridas al mi.

- Kiam simio aplaŭdos, tiuokaze homoj aplaŭdos al ĝi ankaŭ.

- Por ke korko subakviĝu, ni devas post provo la nesubakviĝintan parton fortranĉi.

- Al duelo oni defiis pro ofendo je honoro. Kiu venkis, tiu pravis.

- Cindrulino estis junulino, kiu ricevis amaseton, kiun ŝi grupigis.

- Helikoptero staras en unu loko, ĉar ekzemple estas finiĝinta ĝia benzino.

- La unua grado de idioteco estas sento de genieco.

- Se pigo havas makulojn nigrajn kaj inter ili blankajn, tiuokaze tio estas virbesto. Se ĝi havas makulojn blankajn kaj inter ili nigrajn, temas pri inbesto.

- Kiam leono en cirko estas finiĝinta ekzercadon, tiel dresistino kliniĝas al ĝi.

- Polipo havas sakan korpon konsistanta el polipaĵoj.

- Modelon de aviadilo ni konstruis precize laŭ plano. Kiam blovas vento, do flugas sole tiu plano.

- Mi havas ŝancon esti en la vivo tre saĝa. Survoje al tio mi jam faris ĉiujn erarojn, kiuj estas entute eblaj.

- Komponisto planis komponaĵon tiel, ke morto nervostreĉe intensiĝu en ĝi.

- Mi bone aŭdas, ĉar mi havas pli grandajn orelojn.

- Pejzaĝo estis verŝita de la suno, sed de tute seka.
- Vespo estas pli saĝa ol abelo, ĉar kiam ĝi donos pikilon, ĝi ne mortos.
- Niaj gepatroj alveturigis el Hungario paprikon, el Bulgario pliskon kaj el vilaĝo la avinon.
- Mola ligno estas ekzemple alumetoj.
- Kukolo pri idaro ne zorgas, ĝi ne havas por tio pro nura kukolado tempon.
- La panjo faras tiel bonaj marmeladoj, ke post ili apenaŭ restos glasetoj.
- La langon mi havas kovrita per mukozo, kiu sekrecias vortojn.
- Decaj infanoj estas tiaj, kiuj ne drinkas, ne fumas kaj ne diras vulgarajn vortojn antaŭ la gepatroj.
- Suneklipson mi ne vidis. Estis preskaŭ mallumo.
- Simplaj frazoj estiĝas tiel, se ni kune kunigos kelke da vortoj tiel, ke ili estu almenaŭ du.

- Hodiaŭ mi jam ne staris en angulo, ĉar jam nenia estis libera.

- KION KULPIGIS TELEFONCENTRALO.
Edzino de sinjoro Novulo kuŝis en malsanulejo. La zorgemo de la edzo estis granda, tial tuj la sekvantan tagon post la operacio li telefonis en la malsanulejon. Aŭdiĝis al li ĉefkuracisto dirinte, ke sinjoro Novulo atendu, ke li iros rigardi en ĉambron. Intertempe la centralo pro eraro kunigis sinjoron Novulon kun estro de aŭtoriparejo, kiu telefonis kun posedanto de motorciklo, kiu estis riparata tie. Sinjoro Novulo pensante, ke li parolas kun la ĉefkuracisto, ekatentis, ĉar li timis pri la edzino. Kaj tion ĉi li eksciis: ”La laboro estis malfacila, ni devis doni novan postaĵon. Vi veturis tro rapide kaj ofte. Ankaŭ mi devas diri al vi, ke via piŝto estas jam malnova kaj eluzita. Hodiaŭ matene ni provis tion kun ankoraŭ pli granda ol estis la via kaj ni estis surprizitaj pri la rezulto. Ni uzis kiel eble plej grandan pezon, kian ni povis kaj kia estis eltenebla. Ĉe tiu ŝarĝigo krevis gumo. Sekvojn vi havos nur vi mem, ĉar vi estis aĉetonta pli bonan markon. El la antaŭaĵo elfluis oleo kaj el la postaĵo fumiĝis. Tiel la antaŭaĵon ni ŝtopis per ĉifono ...” Tion jam sinjoro Novulo ne aŭdis, trafis lin apopleksio.

- Sekco pruvis, ke paciento mortis nur dum sekco.

- Mi ekkonis, ke ekzistas pli belajn klarigojn ol en la lernejo.

- Kiam hipopotamo oscedas, tiam ĝi ridas.

- Knabino havis sur la kapo blankan ĉapeleton kaj bluajn ŝuetojn.

- Abio kreskis sola en densa abia arbaro.

- Diferenco inter mineralakvo kaj riverakvo estas en tio, ke la riverakvo estas enverŝiĝanta maron kaj la mineralakvo en botelojn.

- Kiom da jaroj daŭris tridekjara milito, mi precize ne scias, sed ĝi daŭris tre longan tempon.

- Kvankam mi kuras plej rapide el la tuta klaso, leporon mi ne ĝiskuros.

- MI AMAS VIN.
  Mi ne scias, per kiaj vortoj esprimi mian amon al vi. Nur vi scias, ke mi bezonas vin. Sen vi mi estas nenio.

Neniu salutas min, la amikoj forsidadas de mi, junulinoj ridas al mi. Tio ne estas grava por mi. Mi amas vin, nur vin. Vi estas mia vivo, mia hodiaŭa tago, mia ĉio. Venu! Kiam mi havos vin ĉe mi kaj kiam ajn mi povos karesi kaj kisi vin, mi iĝos feliĉa. Denove mi havos multe da amikoj, denove mi iĝos estimata civitano. Plezure mi iros kun vi en vendejon, en vinejon kaj mi estimos ĉiun momenton kun vi, ĝis kiam mi denove ne adiaŭos kun vi. Nun mi estas malĝoja kaj mi diras al mi: ”Ankoraŭ du tagojn mi devas elteni sen vi. Kiel mi vivos sen vi? Ili estos tiel longaj. Mia sopirplene atendata — salajro!”

- Ĉiuvespere enlitiĝinte li diris al ŝi: ”Karulino, belajn sonĝojn pri tio, kion vi dezirus.”

- Malfacile estis konstateble, kiuj el liaj vortoj estas mensogaj kaj kiuj malveraj.

- En la lernejo mi eksciis multe da utilaj aferoj. Ekzemple tion, ke plimulto da knaboj el la klaso ricevas pli altan poŝmonon.

- Leporo dolĉe dormis, ĉar ĝi sonĝis pri karoto.

- Li forte batis sin en la kapon, tial li ankoraŭ longtempe lamis.
- La unuaj homoj estis akirantaj fajron per frotado kaj poste ili estis disvastigantaj ĝin per malnovaj ĵurnaloj.
- Arkitekturoj de centjaroj estas tiaj, kiujn oni konstruas cent jarojn.
- Tendo estas komforta kaj mi dormas en ĝi tute same kiel hejme dum dormado.
- Pegaso havis evidente ĉevalkarakteron.
- Laboro estas por mi la plej bona amuzo, sed mi ne povas senĉese amuzi.
- Fiulo, vi ne meritos, ke vi sidu apud decaj homoj! Vi sidiĝos apud mi, kaj vi eĉ ne moviĝos!
- Laŭ leĝo pri tergravito rajtas homoj fali nur teren.
- En kinejo oni ludas, kio ĉi tie ankoraŭ ne estis.
- Paĉjo havis hejme lastan vorton. Li diris, ke panjo pravas.

- Kiam geaktoroj estas ludantaj, tiam ili trompas publikon, ke tio estas ili.

- Boksistoj portas sur la manoj gantojn, por ke ili boksante ne gratu sin.

- Estis tiel varmega tago, ke ien supren grimpis sole termometroj.

- Farbojn mi miksis laŭ tio, kiel mi vere vidis la naturon kaj laŭ tio, kiajn Evo pruntedonis al mi.

- En la vilaĝo vivas homoj kaj en la urbo nur loĝantaro.

- La plej raraj markoj estas jam ne plu validaj.

- Salamo enpikiĝos sur pli longan branĉeton kaj poste ĝi rostiĝos kvazaŭ ĝusta kolbaso.

- En tendaro mi denove renkontiĝis kun kelkaj malnovaj junaj amikoj.

- Kiam ni estas en kabano, ni dormas ĉe malfermitaj fenestroj, por ke povu enflui al ni freŝa sano.

- Ĉi tie vi ne estas en restoracio, sinjoro, ĉi tie ci estas en uzina manĝejo, ulo!

- Glubendon ni havas, sed ni ne povas ĝin malglui de breto.

- Se jam sinjoraj moŝtoj pagis, do tiujn ulojn elĵetu.

- Li havis tian sklerozon, ke kartorakolantoj devis montri lian pasintecon.

- Aleksandro komandis al ekskursoj eksterlanden, kie li faris ĉiĉeronon.

- Nigra maro havas multe da refreŝiĝejoj kaj similaj allogaĵoj.

- Se vi ankoraŭ morgaŭ sentus vin malbone, do venu la lernejon kaj mi sendos vin al kuracisto.

- Neniam naŭzis al li subaĉetojn kiel tiam, kiam li devis ilin doni.

- Se iu en ekskurso perdiĝus, tiu devas mem troviĝi. Kunveno estos en placo.

- Hibridoj estas homoj, kies gepatroj havas diversan sekson.

- Ni startos en minutaj intervaloj po minutoj.

- Sunradioj flugas al ni longtempe, pro tio ili tiel akriĝos, ke ili pikas.

- DEMANDO.
  Antaŭ dek kvar tagoj mi aĉetis 1 kilogramon da kotletoj. Sed tie estis homamaso kaj la kotletoj estis en sangmakulita saketo. Hejme per fortranĉo de viando mi konstatis, ke en la saketo estis 60 dekagramojn da ostoj. Reston kreis forte fiodoranta viando. Ĉu mi povas ie validigi garantion?

  RESPONDO.
  Problemo estiĝas en tio, ke vi ne subskribis vian nomon. Ne eblas tial prijuĝi, ĉu temis pri nutraĵvaro aŭ pri furaĝo. Unu kaj la sama aĵo povas esti foje nutraĵvaro kaj alifoje denove furaĝo. Ni diru, laktuta salato, alportita al homo estas nutraĵvaro, sed la sama salato, alportita ekzemple al testudo estas jam furaĝo. Rilate al nutraĵvaro estas garantia tempo ok tagojn, sed rilate al furaĝo plenajn tri semajnojn. Ĉar laŭ kono pri skribado eblas prijuĝi, ke vi estas homo, temas pri nutraĵvaro kaj la garantio estas pasinta. Sed se vi ek-

zemple estas rabobesto, tuj vi aŭ via mastro validigu garantion!

- Ludolfo estis numero, pri kiu ni lernas.

- Antikvaj grekoj revenis kun ŝildo, sur ŝildo aŭ sub ŝildo, se pluvis.

- Estro de unu afrika tribo vizitis Erarlandon kaj post sia reveno lia tuta tribo ĉirkaŭigis lin:

  —Rakontu, estro. Kiel oni vivas tie?—

  —Interese. Mirinde. Eksterordinare, preskaŭ nekredeble. Do ekzemple: mi vidis tie grandegan rektangulon kun belege pritondita herbejo. Subite tien alkuris 11 sinjoroj en blankaj vestoj, tuj post ili 11 sinjoroj en ruĝaj vestoj, poste serioze alkuretis du sinjoroj en nigraj vestoj kaj subite sur la herbejon venis ankoraŭ unu sinjoro en nigra vesto. Kun fajfilo en la mano. Kaj en tiu momento, kiam li ekfajfis en la fajfilon, komencis pluvi.—

- Neeblaĵojn mi aranĝas tuj, miraklojn ĝis tri tagoj.

- Knabo dormis metinte la kapon sur la dekstran genuon de la maldekstra kruro.

- Sinjorino instruistino estas tial tiel saĝa, ke ŝi vizitas senĉese lernejon.

- Mia paĉjo havas unusolan hobion: kiam li estas veninta hejmen, tuj li enlitiĝos.

- Kiam antikvaj egiptanoj estis mortantaj, tiam ili envolviĝis en mumion irante ripozi en piramidon.

- En julio estis tia varmego, kvazaŭ estus somero.

- Pezon de malmolaj korpoj ni mezuras per kilogramoj, likvaĵojn ni esprimas en litroj kaj longecon ni difinos per liniilo.

- Malantaŭe iris maljuna homo. Tiu povis esti proksimume dekokjara.

- Viva bildo estas tia, kiam homoj estas starantaj tiel senmove, ke ili aspektas kiel mortaj.

- Mi prenis por mi virkaton Voskon, kiam ĝi estis ankoraŭ katido.

- En miaj ŝuoj mi sentas min kiel hejme.

- La desegnaĵon mi ne havas ankoraŭ preta, ĉar la paĉjo ne plu havis tempon.

- Hejme ni havas kelke da bildoj, sur kiuj estas floroj, pejzaĝoj aŭ nur elverŝitaj farboj.

- La bildo de Tertremo estas preta katastrofo.

- Bildo estiĝos, se la mano obeos la okulon de pentristo.

- Mi demandis la amikon: ”Josefo, kiel ili nomigas vin?”

- Mia amiko havas belan vizaĝon kun malbona karaktero.

- Rano naĝis tre rapide, ĉar ĝi remis per la manoj kaj per la kruroj.

- Kristnasko apartenas inter la plej belaj festotagoj de la jaro, precipe en decembro.

- Tra kie li estis kuranta, tra tie ili estis pelantaj lin.

- Ĉokolado estas miksaĵo de kakao, sukero, lakto kaj pakumo.

- Koleri signifas fari malbonon en la propra korpo pro idioteco de aliaj.

- Kovkokino kondukis kokidojn, instruante ilin, kiel oni ĝuste batas en la teron.

- Kiam ĉiuj estos alportintaj la kapojn en vestgardejon, ni trovos posedanton de la ĉapo.

- Pavianoj vivas en grandaj grupoj, kie perdiĝos iliaj pli-longiĝintaj vizaĝoj.

- Persikon sukcesas kulturi en pli varmaj teritorioj, ali-loke estas el ĝi citrono.

- Per fremdaj aferoj ordinare fanfaronas tiuj, al kiuj es-tas nenio fremda.

- Orkestro estas granda muziko, kiu forte ludas.

- En opereto kantistoj ripozas per parolado.

- Li scias ja, kie estas lia loko, sed kian signifon tio ha-vas, se li dormetas tie.

- Doni al li, kion ni vidas je liaj okuloj, signifas doni al li okulvitrojn.

- Oni ruĝiĝas tial, ke alie oni devus honti.

- Kafon ni donas al gastoj, por ili havu puran kapon, se ili ankoraŭ bezonus ĝin.

- Lumon en klasĉambro ni ne bezonas intiman, sed laboran.

- Infano estas maturiĝanta plenkreskulo.

- Mi havas por mi nur dormon.

- En baseno estis kapo sur kapo, sed plimulte ili estis apud si.

- Ni ludis tiel interesan ludon, ke ankoraŭ nun neniu scias, pri kio propre temis.

- Ĉiam, kiam sinjorino instruistino rememorigas al ni, ke konstrui fundamentojn en sablo estas al nenio, mi rememoros: ”Kaj piramidoj?”

- Nia taĉmento alkuris ja kiel la lasta, sed ni sciis tion kiel la unuaj.

- Ĉiu pensas, ke hundo ŝatas manĝi ostojn. Sed kio estas farebla, se viandon neniu donos al ĝi.

- Veturigisto estis veturisto sur rivero.

- Tiu ĉi situas ĝuste sur la loko de tiu ĉi makulo sur la mapo.

- Fajreroj el tendarfajro estis flugantaj alten, iuj eĉ tute supren.

- Ni jam ne havas klason en klasĉambro.

- Ne estas grave venki, sed akiri ateston pri ĉeesto.

- Pediatro: ”Nu, manĝu tiun bulketon! Pensu ekzemple, ke tio estas sableto.”

- Pino donas lignon nur por mola aŭ duonmola meblaro.

- Al vintro apartenas freŝa aero kaj tuso.

- Per longtempa sunbruniĝado ni atingos iam tian koloron, ke devas tuŝi ĝin nek aero.

- Dum ferioj la gepatroj prenas libertempon kaj ni vizitos per aŭtomobilo multe da memorindaĵoj kaj aŭtoriparejoj.

- Pafilo konsistas el kvar partoj. Tio estas tiuj ĉi tri partoj: paftubo kaj celilo.

- En la urbon ni veturis per trajno, reen mi denove sentis min malbone en aŭtobuso.

- Ĉevalido estas ido de ĉevalo en antaŭlerneja aĝo.

- Kukolo ne zorgas pri idaro, ĝi devas likvidi raŭpojn.

- Je via loko mi sidus sur loko.

- Bukloj estas haroj, sed eble ĉe bukligita knabino.

- Rivero akceptas apudajn enfluojn, plimulte el ĉiuj kvar flankoj.

- En kastelo estis multe da belaj aĵoj, ke ni havas ilin tiom nek hejme.

- Mi konas multe da fungoj. Precipe mi kolektas tiujn, kiujn mi trovos.

- En gantoj mi manĝas tial, ke mi havas malpurajn manojn kaj mi ne volas malpurigi la manĝaĵon.

- Tiu hodiaŭa tago bele komenciĝas al mi, diris kondamnito je morto survoje al ekzekuto.

- Al pakumita donaco mi alpaŝis tenere kun tranĉilo en la mano.

- El ĉiuj manĝaĵoj mi ŝatas plej multe limonadon kaj remaĉgumon.

- Kiel deziro mi dezirus esti jam tre granda, por ke mi povu iradi vespere kinejon.

- Mi veturis la naturon, ke mi ravu ĝin per mia beleco.

- Unu miliono da virinoj estas grandega forto, sed kiomfoje sufiĉas sole unu.

- Ni ĉiuj estas homoj eraremaj, sed ne al ĉiu tio oni pardonos.

- En la kapo mi havas sufiĉe da nesufiĉoj.
- Hodiaŭ ni jam scias, ke en Luno estas polvo, sed oni flugos tien senĉese.
- Li diris pri si, ke li estas bona dancisto, sed plej bone li sciis viskion ĉi tien, viskion tien ...
- Diferenco inter kontrabaso kaj violono estas tiu, ke kontrabaso pli longe brulas.
- Apenaŭ piloto komencos labori, tuj li elflugos.
- Paĉjo sekigas al panjo perukon sur sia kapo.
- Harpo estas muzikilo kun multe da interspacoj.
- Ekzemplo de egalrajteco estas kvindekjara viro, kiu havas du dudekkvinjarajn amikinojn.
- Ekskursante ni preskaŭ eĉ ne spiris, ĉar gvidinto kondukis nin je la nazo.
- Mi memoras ankaŭ forgesintaĵojn.

- Oni ŝparos, tio kostu kion ajn!

- Li drinkis kiel ĉielarko, sed entute li ne estis tiel ĉarma.

- Konstante li erarigis krompagojn por infanoj kun krompagoj por biero.

- Jam laŭ du sanitaraŭtoj, starantaj antaŭ enirejo ĉe stadiono, estis tuj klare, ke nomo "amika matĉo" estas nur simbola.

- Estimata juĝa moŝto, irinte kun akuzato en arbaron mi sciis, ke mi perdos ion, sed ke tio estos retikulo, tio ekmemorus min nek en sonĝo.

- Kion vi povas fari hodiaŭ, prokrastu ĝis postmorgaŭ kaj morgaŭ vi estos libera.

- Se mi ne eraras, tie estis skribita io pri elektitaj virinoj, kiuj kapablas moviĝi sur limo inter emocia poezio de pura amantino kaj tortuta sorĉo de belega ĉiesulino.

- Platona amo estas tia amo inter geedzoj.

- Kiam ili estis markintaj novan vojon, estiĝis problemo, kiu surŝutos pluvglacion.
- Homoj estas balailo de alkoholaĵo.
- En arbaro mi orientiĝas plej bone laŭ tio, ke mi rigardas, kie arboj havas likenojn.
- Serpentoj estas reptilioj kun cilindra korpo en formo de gumtubo.
- Korpo bezonas dormon, kiu fortigos ĝin por pluaj lernejbataloj.
- Onklo estas viro kiel monto, sed iom pli malalta.
- En fabeloj gajnas bono, tiuokaze edziniĝos en ili preskaŭ ĉiu princidino.
- Frato ankoraŭ ne scias bone naĝi, dum li portas en la akvon diversajn aerajn aldonaĵojn.
- Ĉe tendarfajro ni kantis diversajn belajn kantojn kaj similajn prelegojn.

- Grandan Urson ni trovos sur firmamento facile, ĝi estas ja el steletoj.

- Akuta malsano estas malsano, kiam estas pro nenio subite malbone.

- Ensemblo kantis kaj estis rimarkinde, ke ni komprenis al ĝi.

- Lumbriko estas la sama el ĉiuj flankoj. Ĝi havas la kapon antaŭe kaj malantaŭe kaj fakte ĝi havas nenian, ĉar ĝi estas vosteto. Se ĝi elrampos en lumon, ĝi tuj enrampos, ĉar ĝi ne havas okulojn. Iaj lumbrikoj faras humon sur la tero kaj tial ili estas tre utilaj. En somero ili vivas en malprofundaĵo kaj en vintro en profundaĵo.

- Legolibron mi ne havas, mi devis ĝin forgesi sur la tablo, kiam mi submetis per ĝi varmegan tason da teo.

- Estis tia varmego, ke mi rigardis, ĉu en nia vilaĝo ne aperos kameloj.

- Ĉiu naskiĝos kiel analfabeto.

- Homoj, kiuj renkontis nin, pensis, ke junulino, iranta apud mi, estas mia fratino. Ili pravis, tio estis mia frato.

- Kuracisto diris al mi, ke mi estas kiel beto. Poste li aldiris, ke eĉ ne tiel sana kiel malpura.

- Ĉu neniu vidis mian tablotenisan pilketon, kvankam mi detale priskribis ĝin? Ĝi estis tia eta ronda.

- Hieraŭ mi ne ĉeestis dum testo en lernejo tial, ĉar mi konjektis, ke doloros min la kapo.

- La plej rapida besto estas aŭtomobilo, ĉar ĝi havas 40 ĉevalojn sub kapoto.

- Hundo havas bonan flarsenton kaj ĝi ne kunpuŝiĝos kun obstaklo, eĉ kiam la obstaklon ni forigos.

- Kio kuŝas je nia koro, tion ni estus dirontaj de la pulmo.

- Ĉevalo ne povas salti flopmaniere, ĉar ĝi kuŝkovrus rajdanton.

- Monologo estas tio, kiam paĉjo senĉese hejme silentas.
- Kiam panjo tranĉvundos sin, tio signifas, ke ni vespermanĝos konservaĵon.
- Venis instalisto kaj formanĝis nian vespermanĝon.
- Dum epidemio ankoraŭ neniam mi sukcesus kapti gripon.
- Difekto ne estis en nia radioaparato, sed en ĉizilo de paĉjo.
- Aŭreolo estas tio, kio entute ne estas.
- Atleto estas homo, kiu ion kulturas.
- Doloron mi sentas nenian. Mi havas nazkataron.
- Multe da vilaĝoj havas nomon laŭ tio, ke tie estis travadejo aŭ alia komunikilo.
- El limonadoj mi plej multe ŝatas glaciaĵon.

- Sovaĝa bestaro estas utila pro tio, ke ĝi lasas sin ŝtopi en muzeojn.

- Korniko estas birdo, kiu havas nigrajn plumojn, la fortan bekon kaj ĝoje ĝi sidadas sur branĉo kun peco da fromaĝo en la buŝaĉo.

- Regiono enhavas kelke da distriktoj kaj vilaĝoj.

- Maturiĝinte frukto falos malalte super teron.

- Kortbirdara viando estas facile digestebla tial, ke ĝi en viva stato flugas.

- Mi ne povis iri lernejon, ĉar hardante mi malvarmumis.

- Milibaroj estas iaj vesperaj pli malgrandaj drinkejoj.

- Paĉjo havas malsanon pro profetaĵo.

- Mi ne volas lerni, sufiĉas al mi, ke mi vivas.

- Mempriservado estas tio, kiam mi mem devas skribi mian hejman taskon.

- Plej volonte mi plorus super la gepatroj, sed ili ree super mi.

- Kiam mi devos razi min, mi ne devos lerni.

- Ni havas loĝoĉambron sole por montrado.

- Jam mi estas unusola lernanto en la 5-a A, kiu ne proprumas komputeron.

- Oni super tiu difino preskaŭ miras, kio restis el ĝi.

- Divano estas farilo ripoziga.

- Se el tio, pri kio mi ĉi tie rakontas al vi, en tiuj viaj kapoj restos nenion, do skribu tion por vi. Mi ankaŭ skribas ĉion por mi.

- Eklernu iradi ĝustatempe al la leciono. Ĉu vi vidis min, ke mi estus venanta en la klasĉambron dum klarigado?

- Do mi rememoris, ke mi forgesis tion.

- En klarneto estas muziko ŝtopita per truetoj.

- Nemenciita formulo validas eĉ dum tiuj ĉi supozoj.

- Tiel mi ĝojas, ke vi finfine eklernis botanikon. Nu, vi vidas, kiel vi sukcesas, kiam difektiĝis via televido.

- Montogrimpanto faras truetojn en rokojn, por ke ili povu erozii.

- Trajno, enveturinte en tunelon, postlasas post si malfermitan truon.

- Por ke mi havu antaŭ la gepatroj alibion, mi skribas por mi sekretan taglibron.

- Kiu pensas, ke jam sufiĉe scias, tiu komencas esti stultulo.

- Malsukcestimo estiĝis en mia biŝo, tuj kiam ili estis suprentirintaj kurtenon.

- Naĝante en baseno mi alterne estas distiranta la akvon kaj la amikojn.

- Ludi futbalon mi ankoraŭ ne scias, sed piedbati jes.

- Vojo rampas ĉe herbejo.

- Ĉar mi ne estas maldiligentulo, mi forportis kuŝilon en ombron sub arbon.

- Ankaŭ mi vizitas ĵudon. Mi sternas tie matracojn.

- Telefonis prezidanto de kooperativo el instruado al zooteknikisto: "Kadavriĝis nia bovo, ĉu ni aĉetu novan aŭ ĉu ni atendu vin?"

- Ni petas pri redono de bovino, kiu estas graveda post kooperativestro, kiu transloĝiĝis.

- Mi petegas, ke mi estu kontentigita, aliokaze mi turnos min al publiko.

- Mi ricevis skiojn, sed malbonajn, mi scias stari sur ili sole sur tapiŝo.

- Li ekridis tiel, ke li ekploris.

- Ĉevalo havas kvar krurojn kaj tio ebligas al ĝi iradi ĉiuflanken eĉ retroen.

- Mi ŝatas veturi per biciklo, ĉar mi jan scias vojturni kiel plenkreskulo.

- Kiam estas hejma medikamentujo elĉerpita, mi kuras al sav-deĵorkuracisto.

- Bovino peligas siajn malamikojn per la vosto.

- Leono estas reĝo de bestoj, sed por nia hundo tio estas tute indiferenta kaj tial ĝi bojas je kiu ajn.

- Al infanoj en jun aĝo estas alumetoj forprenataj, ĉar ili estas tro brulemaj.

- Ĉar estas vespere sur la firmamento steletoj, ne povas rigardi ilin infanoj, se ili ne estas geamantoj.

- Montogrimpanto sur ŝnurego ofte sentotimas pro streĉo, ĉu ĝi ne traŝiriĝos.

- Kolumbus devis trovi Amerikon, ĉar ĝi estas granda.

- La unua mondmilito estis la unua milito, kiun oni numeris.

- Al infano sinsekve naskiĝos 25 laktodentoj.

- Bildoj havas prezon de katalogo.

- Kontraŭ muŝoj ni hejme batalas per araneaĵoj.
- Koko kokokrias frumatene, ĉar pli malfrue kokinoj ne plu permesos tion al ĝi.
- Nuntempaj porkaĉoj estas porkoj.
- De fioŝlago estas aŭdebla kvakado de ranoj kaj dum bela vetero ankaŭ de infanoj.
- Hejmriparisto povas permesi al si en ĉion bori.
- Konkursanto estas homo kiel mi, sed tiu havas numeron.
- Nia aŭtomata lavmaŝino estas paĉjo.
- Paĉjo neniam eklernos simuli kiel futbalisto.

www.omnibus.se/inko

ISBN 91-7303-181-X